


JEN BULTENO

enero/febrero 1966





## JEN REPRESENTANTOJ

Arthur Morse . . . . .	Western Massachusetts
Naomi Sabghir . . . . .	University of Maryland
Jim Craighead . . . . .	Long Beach Polytechnic H.S. Calif.
Pat Spaeth . . . . .	San Diego
Nelly Perez Yip . . . . .	Puerto Rico
Fred Shell . . . . .	University of Calif., Berkeley
D-ro Rodney Ring . . . . .	Muhlenberg College, Allentown, Pa.
Tom Davidson . . . . .	Portland State College, Oregon

JEN petas ke ĉiu junulara Esperanto-grupo sur loka aŭ lerneja nivelo elektu unu el siaj membroj kiel oficialan reprezentanton al JEN. Sendu la nomon al la Sekretariino .

---

## I N D E K S O

oooooooooooooooooooooooooooo

Editorial . . . . .	3
Vortoj de Humphrey Tonkin . . . . .	7
Aforismoj de Kristina . . . . .	.10
The Rolling Stones . . . . .	.11
Akademio de Esperanto . . . . .	.13
Notoj pri Morgaŭa Lando . . . . .	.14
Gravega Anonco de UEA . . . . .	.16
La Tagon La Mondo Savigis . . . . .	.20
Solvo al Krucvortludo . . . . .	.23
Recenzo . . . . .	.24
Intensive Esperanto Course . . . . .	.26
New JEN Projects . . . . .	.27
Poems . . . . .	.28,29
Deziras Korespondi . . . . .	.32



Persuading people to sign the UN petition does not, however, have to be a chore. The Univ. of Calif. Esperanto Club, for example, not only enjoyed sponsoring its petition drive, but also achieved a great deal of success. The members decided that a brief information sheet (included in this Bulteno) should be given to as many people as possible and that individuals, who, after reading the information, wished to sign the petition could return to a centrally located table to do so. More than ten petitions were completed.

Acquiring a large number of signatures is beyond a doubt an important way to bring Esperanto before the international community. Therefore, it is our hope that other JEN members will be able to collect enough signatures to make the petition drive a huge success. Petitions can be obtained from:

Paul Stein  
P. O. Box 10001  
San Diego, California

GRAVEGA  
ANONCO DE JEN  
oo

SE VI NE JAM PAGIS VIAN KOTIZON POR 1966, NEPRE  
FARU TION TUJ !!!

ĈI TIU NUMERO ESTAS LA LASTA KIUN VI RICEVOS SE VI  
NE TUJ SENDAS VIAN KOTIZON (\$2.00/jare) AL:

---

Stanley Cohen, JEN Kasisto  
16 Long Avenue  
Allston, Massachusetts  
02136

-----  
TO: Stanley Cohen, JEN Kasisto

Please renew my JEN subscription/membership for 1966.  
Enclosed is \_\_\_\_\_.

Name \_\_\_\_\_

Address \_\_\_\_\_

City \_\_\_\_\_ State \_\_\_\_\_

Zip Code \_\_\_\_\_

PLUA  
JEN ANONCO

oo

THE POST OFFICE informs us that soon it will stop  
delivering third-class mail which  
does not bear a zip code.

TO INSURE delivery of your JEN Bulletin, send Stan  
Cohen your zip code at once!

---

AND . . . . if you change your address, tell us so.  
It costs a fortune every month in  
return postage expenses...and you  
don't receive your JEN Bulletin.





Kion TEJO faras? Ĝi produktas revuon (Kontakto) kaj raportojn kaj regulan informilon (ĉefe por neesperantistaj junularaj organizoj) en la angla kaj franca lingvoj; ĝi organizas ĉiujaran Kongreson (ĉi-jare en Hungario, pasintjare in Japanio, venontjare en Israelo); ĝi aktive laboras en tiuj mondopartoj kie ne ekzistas naciaj organizoj (ekzemple Afriko kaj, plej nove, Latinameriko); ĝi laboras inter studentoj kaj lernejanoj pere de speciala komisiono; ĝi funkciigas edukajn seminariojn por junularaj gvidantoj; plej grave, ĝi konstante pligrandigas sian areon de aktiveco kaj ĝi rapide kreskas laŭ membronombro kaj entuziasmo.

Kion ni faru en la kadro de TEJO? Unue, ni ne pensu ke ni simple laboras por JEN, aŭ por nia regiono: ni komprenu ke ni laboras por internacia movado. Due, ni fariĝu unuopaj anoj de TEJO. TEJO estas la junulara sekcio de la Universala Esperanto-Asocio, la plej grava internacia organizo de la Esperanto-movado. Membroj de U.E.A. malpli ol 25-jaraj estas aŭtomate anoj de TEJO. Por ricevi la revuon de TEJO (kune kun la revuo kaj Jarlibro de U.E.A.) oni devas aliĝi al U.E.A. kiel tielnomata MAK au JMA. MAK estas ano de U.E.A. inter la aĝoj 21 kaj 25. JMA estas ano de U.E.A. malpli ol 21-jara. JEN donas specialan rabaton al membroj de U.E.A. en tiuj kategorioj. Utiligu ĉi tiun unikan okazon. Ne estu naciisto.

Fariĝinte unuopa membro de TEJO, interesigu pri ĝia laboro. Helpu al JEN plene kunlabori en la diversaj projektoj de TEJO kiel nacia sekcio. Certigu ke la nomo kaj idealoj de TEJO estas ĉiam en la atento de

Daŭrigo sur p. 26

JENANOJ - EK AL!!!  
oo


KIAM vi pasintfoje skribis al Pat Shell, la sekretariino de JEN?

SENDU viajn novaĵojn regule al ŝi....

PETU ŝian helpon....

PROPONU vian kunlaboron....

HELPU al JEN kaj TEJO kaj ESPERANTO !











NOTOJ PRI MORGAŬA LANDO  
oo

Bill kaj Cathy Schulze

La Meksikia Esperanto-Kongreso okazis en Meksiko Dec. 26 ĝis la 30an 1965. Ĉiutage bonaj artikoloj aperis en la ĉefaj ĵurnaloj: La Prensa, Novedades, El Heraldo, Excelsior, El Universal, El Sol, The News (angle); bonaj intervjuoj okazis ĉe televido kaj radio.

Jen kelkaj eroj de la Kongreso....

Unua Rom-Katolika Meso en Esperanto en Nord-Ameriko.  
Juna pastro, Jose C. Lopez, celebris la Sanktan Meson en la Preĝejo de Sankta Hipolito en la urbocentro. Profesiaj kantistoj kantis la Meson Esperante. Tiel malfermis la 4a Meksikia Esperanto-Kongreso.

Olimpikaj Ludoj, Meksiko, 1968. Junaj Esperantistoj en Meksiko stimulis intereson por Esperanto kiel solvon de la lingva problemo dum la Olimpiado. Gravaj instancoj en la Organizaĵo de Promocio Internacia de Kulturo (Sekretaria de Relaciones Exteriores) donis senpage la uzon de la moderna kongresejo, kaj moderna aŭtobuso por la kongresekskurso. Ili daŭrigas tiun helpon per uzo de modernaj ĉambroj por lecionoj en la urbcentro.

Blindaj Studentoj studas Esperanton sub la gvido de la Meksikia Esperantista Junularo kaj kelkaj blinduloj entuziasme partoprenis la kongreson.

Centro Kontraŭ Mem-Mortigo (Suicide Prevention Center) La junuloj kunlaboras kun la volontuloj

Daŭrigas sur p.31



NEW BOOKS

oo

ESPERANTO: A NEW APPROACH - Wm. Auld \$1.25

Presents unique possibilities of Esperanto grammar - offers sophisticated introduction to Esperanto literature, drawing upon both original writing (KREDU MIN, SINJORINO Rossetti) and translation (Shakespeare).

NE KIEL MEIER - Raymond Schwartz \$ .50

Esperanto's foremost humorist offers the most simple and clear look at Esperanto verb forms to date.

Available from:

WEST COAST ESPERANTO BOOK SERVICE  
2129 Elizabeth Street  
San Carlos, Calif. 94070

(Operated by JEN member, Frank Lanzone, Jr.)

G R A V E G A

A N O N C O D E U . E . A .

oo

LA POR-PROPOŬA LABORO NE JAM FINIĜIS

Lasta, sed urĝa, alvoko al ĉiuj!!

Respondante al peto de UNESKO daŭrigi, ankaŭ en 1966, la agadojn planitajn por 1965 laŭ la Laborplano por la JIK, la Estraro de U.E.A. unuanime decidis daŭrigi, ankaŭ dum la unua jarduono 1966, la varbadon por la PROPOŬO AL UNUIĜINTAJ NACIOJ.

Ĉiuj jam scias ke la rezultoj akiritaj, ĝis nun, estas plene kontentigaj je vidpunkto de la kolektivaj subskriboj; sed ke la nombro de la individuaj subskriboj estas ankoraŭ ĉiam malpli granda ol tiu, kiun ni akiris okaze de la Peticio (1950). La diferenco ankoraŭ estas proks. 200,000!

Se ni tamen akiris pli ol 680,000 subskribojn en UNU jaro, ni, per plia streĉado de niaj fortoj, CERTE kapablos atingi, se ne LA MILIONON, almenaŭ nombron pli altan ol la antaŭa, kiu estis 895,432....sed akiritaj en pluraj jaroj.

Ni diras "CERTE", kondiĉe kompreneble ke tiuj, kiuj jam faris plene sian devon, daŭrigu ankoraŭ dum kelka tempo sian laboron. Sed PRECIPE, kondiĉe ke la centoj da esperantistoj, kiuj ne jam faris ion, inter kiuj estas eĉ kiuj ne jam MEM subskribis la Proponon, plenumu ankaŭ sian plej elementan devon!

Ne povas esti, ke UNU samideano, kiu apartenas al loka grupo, nacia societo aŭ internacia organizaĵo kiu ajn estus ne-subskribinta mem kaj kun siaj familianoj, la Proponon, pri kiu tiom da ESPERANTOJ fidas ke, se ĝi ne tuj helpos al fina venko, ĝi tamen vekos tiom da atento en specialaj medioj, ke ĝi alproksimigos nin al la tago de la enkonduko de la internacia lingvo en la lernejojn.

Restas al ni ĉiuj ankoraŭ iom da tempo...tamen ne multe. Semajnoj, monatoj rapide forflugas. Estas la momento por diri: Ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ!...Prenu do la folion...kaj FINE FARU VIAN ESPERANTISTAN DEVON!

Al tiuj, kiuj jam large faris sian devon, ni diru simple: laŭdon kaj dankon kaj.....daŭrigu!

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
Rotterdam - 11 Januaro 1966

J E N   L E N D I N G   L I B R A R Y

oo

A SERVICE TO JEN MEMBERS

The purposes of the library are to acquaint members with the international Esperanto press, and to provide material for members who want to perfect their command of the language by reading articles written in international style.

This will be done by lending sets of four Esperanto magazines to members for periods of three weeks. Every member may borrow, one at a time, as many sets as he desires. All the magazines will be less than a year old, and care will be taken to see that no one receives the same set twice.

The library will also lend magazines or other Esperanto materials of special interest to members putting on displays or exhibitions.

To borrow a set, simply send 10¢ in coin or unused stamps (U.S.) to:

JEN LENDING LIBRARY  
532 Newport Avenue  
Long Beach, Calif.

NOTE  
NEW  
ADDRESS!!!

YOU CAN HELP....Since the library operates with donated literature, please send any magazines for which you no longer have any use to the same address.

Jim Craighead

KALENDAROJ HAVEBLAJ

oo

SVISA ESPERANTO-KALENDARO 1966

Belegaj kolorbildoj de pejzaĝoj en Svisio.  
Priskriboj kaj informoj sur dorsflanko.  
10-1/2 x 13-1/2 colojn. Prezo inkluzive  
afranko registrita estas 5.50 sfr.

Mendebla je Karl Heinz Mischler  
Franklinstr 29  
8050 Zurich  
SVISIO

GERMANA BESTKALENDARO 1966

Bele reproduktitaj kolorbildoj pri bestoj.  
Klarigoj dorsflanke en Esperanta kaj Ger-  
mana lingvoj. Prezo inkluzive afranko  
estas \$1.10 (U.S.)

Mendebla je Adolf Burkhardt  
7261 Gechingen ueber  
Calw.  
GERMANIO

ĈINA ESPERANTO-KALENDARO 1966

Dek-du paĝoj 37 x 26 cm. kun kolorfotoj.  
(senpage?)

Mendebla je Ĉina Esperanto-Ligo  
Pekino  
ĈINIO

LA TAGON LA  
MONDO SAVIĜIS

oo

Iun fojon, estis studenta organizaĵo dediĉita al tiaj akademiaj celoj kiaj filozofio, socio-ekonomia debatado, kaj amasaj sido-demonstracioj. Ĝia nomo estis "La Neniam-Fidu-Iun-Pli-Aĝan-OL-30-Klubo". Ĝia bataalkrio estis "Neniam!" kaj ĉiu membro ĉiam portis afiŝon dirantan "Hontu!", kontraŭ ebla ekdemonstracio pri io ajn.



Pro la sindediĉemo, fervoro, kaj ĉiama aktivismo de la membraro, la klubo ja efike maldis publikopinion. Ĉi tiun publikopinion daŭre esprimis leteroj al la redaktoroj de la loka ĵurnalaro: "Kial tiuj malpuraj Bitnikoj ne lavas la hararon?" Kaj simile.

Unu tagon, la klubo eklernis je absoluta certeco ke, se iu ne faras ion, la mondo finiĝos semajnon post lundo.

Amasa kuŝ-demonstracio okazis sur la razenejo antaŭ la Blanka Domego. La demonstraciantoj, kun senprecedenta fervoro, kriegis "Neniam!", "Hontu!", kaj kantis, per kvarpartia harmonio, "Ni ja ne moviĝos!" Ili moviĝis, kompreneble. Per la policianoj.

Nature, neniu aŭskultis iliajn vortojn. Preterpasantoj rapidis post la scenejon kun malestimaj mienoj. Iuj kapskuis pro la spektaklo de tiom da barbhavaj junuloj kaj nigre ŝtrumpitaj junulinoj. Kelkaj paŭzis por kriegi, "Kial vi malpuraj Bitnikoj ne lavas la hararon?" Kaj simile.

Fotografistoj fotografis kelkajn junulinojn fortrenigatajn kun la juĵoj super la kruroj. Kaj laca ĵurnalisto skribis mallongan subtitolon pri "plua amasa aresto de malnete vestitaj demonstraciantoj, kiuj ŝajne favoras la legitimon de mariŭano."

Kvankam alĉutimiginta al tia reago, la klubo vokis urĝan kunsidon. "Samideanoj," diris Klubprezidanto Jack Armstrong, gratante la barbon, "Ni scias preterdube ke, se io ne estos farita, la mondo finiĝos semajnon post lundo. Tamen, neniu volas nin aŭskulti. Restas nur unu rimedo. Ja granda ofero ĝi estas, sed mi opinias ke la saviĝo de la mondo ĝin meritas."

Aŭdigis krioj de "Neniam!" kaj "Hontu!" - pro forto de kutimo. Sed la propono estis aprobita, kaj la membroj ĉiuj iris hejmen; la junuloj por sin razi, kaj la junulinoj por frizi la hararon.

La sekvantan tagon, la demonstraciantoj aperis denove antaŭ la Blanka Domego. Sed ĉi tiam la junuloj portis buton-kolumajn ĉemizojn, Harvard-stilajn kompletojn,

kaj konservative striitajn kravatojn. Kaj la junulinoj portis najlonajn ŝtrumpojn, pint-frontajn ŝuojn, kaj "bazan" simplan, nigran robon kun perloj.

Anstataŭ porti afiŝojn, ili ĝentile disdonis lukse presitajn folietojn dum mallaŭte kantetante "La Stel-aspergitan Standardon". La folietoj diris, "Kiel koncernitaj civitanoj, ni deziras rigardi kun alarmo la minacantan dangeron de la fino de la mondo semajnon post lundo, kaj ni respekteme sugestas ke iu faru ion.

Preterpasantoj ridetis al la bone vestitaj junuloj, akceptis la folietojn, kaj ofte paŭzis por kunbabili. La rakonto atingis la ĵurnalojn, la prezidanto informigis, faris ion, kaj la mondo savigis. Gustatempe, ankaŭ.

Moralo: En ĉi tiu granda lando la ĉefstone de niaj neforigeblaj individuaj liberecoj estas, ke ĉiu persono rajtas aŭdiĝi. Se nur li sin dece vestas.

Verkita de Arthur Hoppe  
San Francisco Chronicle  
16 Oktobro 1965

Esperantigis Wm. Harmon





## R E C E N Z O

oo

Esperanto: A New Approach, Wm. Auld, Eld. Heroldo, Bruselo, 1965, 92 p.

En la antaŭparolo, Auld sciigas sian intencon: instrui la kapablon legi Esperanton. Li celas la izolitan studenton, kiu lernas sen klasoj kaj sen instruisto. Dek-kvar lecionoj (sume, 60 p.) prezentas la lingvon: la ĉefajn gramatikajn regulojn, 730 radikojn, kaj tradukekzercojn. Sekvas ĝlosilo por la ekzercoj, mallonga vortaro esperanto-angla, utila informo pri vortaroj, studlibroj, gazetoj, kaj naciaj asocioj, kaj laste indekso.

Kio estas nova en la libro? La simpleco kaj klareco de gramatikaj eksplikoj; rezigno "simpligi" la lingvon per arbitra elekto de "tuj rekoneblaj" radikoj aŭ facila sed nenatura verkstilo; matura kaj objektiva prezento; kompreno ke nenio estas tiel simpla, ke ĝi ne bezonas eksplikon; utiligo de poemoj kaj literatur-ekstraktoj elektitaj pro ilia literatura valoro.

Kio estas malnova en la libro? La instrumentodo. Auld prezentas gramatika(j)n regulo(j)n, kun kelkaj ekzemploj; sekvas tradukekzerco esperanto-angla; poste, pli da reguloj, kaj nova tradukekzerco. Kritikinde estas, ke en pluraj (ne ĉiuj) tradukekzercoj, la frazoj ne estas interligitaj.

Bona papero, klara preslego bone impresas. Nur unu preseraro ĝenos studentojn: sur p. 14, sajnas anstataŭ ĝajnas probable perdigos multan tempon por la zorge studanta lernanto.

Restas la tasko diskuti la utilecon de la libro. Mia konvinkigo restas nesangita, ke la libro de Butler, Step by Step in Esperanto, ankoraŭ estas la plej uzinda lernolibro esperanta por anglalingvanoj. Sed estas vere, ke ĝia amplekso kaj ĝia neortodoksa instrumetodo fortimigas multajn potencialajn lernantojn. La kvalito de la verko de Auld estas certe egala al tiu de Butler, sed la amplekso kaj la karaktero de instruado logas multe pli. Konsekvenca danĝero estas, ke la lernanto ĉesos lerni post la 14 lecionoj, kaj restos inter la "eternaj komencantoj". Tiu danĝero estas tre reala, kiam ajn oni uzas malgrandan lernolibron. Sed aparte de tiu averto, mi varme rekomendas ĉi tiun verkon.

Donald Broadribb  
(Melbourne)

El Esperanto, February 1966



## NEW JEN PROJECTS

oo

RESEARCH TOPIC LIST - In the past students have written to JEN requesting a list of topics which could be used for writing themes or research papers. However, no such list has been available. Recently the JEN Estraro voted to compile such a list for free distribution to JEN members and other interested individuals.

However, we need your help. If you have any suggestions for topics (for example:

1. Is an international language necessary
2. Is Esperanto suitable as a bridge language in the teaching of Spanish, French, etc.
3. Psychological effects of using Esperanto in a multi-national, multi-racial setting, etc.),

please send them to Judy Lapenas who will coordinate the project:

Leominster Hosp. Sch. of Nursing, Leominster, Mass.

BIBLIOGRAPHY - Since students have also written to JEN requesting a list of books and articles dealing with the language problem, a second JEN project is to compile such a list.

If you have read or are familiar with books, articles, etc. relating to the language problem, you can help by sending the titles to Judy Lapenas who will also be in charge of this project.

REMEMBER - JEN projects such as these can only work with your help. Therefore, take a few minutes to think about them, jot down your ideas, and forward them to Judy.

L A S E P A T A G O

oo

John Knight\*

La unua tago estis la ĝojo de amo,  
(Dio estis en lia kreigo)  
odoro de fojno sur la kampoj..

La dua tago estis la ĝojo de atendado,  
(Dio estis en lia portigo)  
printempo urĝis sub la blankaj montoj.

La tria tago estis la ĝojo de nasko,  
(Dio estis en lia naskigo)  
kandeloj iluminas la salikojn.

La kvara tago estis la ĝojo de mamoj,  
(Dio estis en lia suĉado)  
mielo en la abelaj kupoloj.

La kvina tago estis la ĝojo de trovado,  
(Dio estis en lia bebridado)  
Rido ĉe la rivereta fonto.

La sesa tago estis la ĝojo de vortoj,  
(Dio estis en lia ekparolado)  
kampanuloj respondas al la fago.

La sepan tagon, venis aviadiloj kun bomboj.

\* Tradukis Marjorie Boulton  
Monda Kulturo, Printempo 1965

---

internacia organizo kies ĉefa bezono estas iom da  
saĝo kaj iom da inteligento.

K U N   J U N A J   M A N - E N - M A N E

oo

Jiri Korinek

Kor' mia batas kun la junaj,  
eĉ se la korpon stampis temp',  
se post iamaj tagoj sunaj  
laŭ vic' nun venas la aŭtunaj,  
mi ne forgesas je printemp'!

Kvankam mi devos fari strekon  
baldaŭ sub mia vivbilanc',  
kaj trenas mian jarkvindekon,  
kaj pentas jam kelkiun pekon:  
el mia man' ne falis lanc'.

Mi kun vi, junaj, simpatias  
kaj volus paŝi al estont',  
kor' mia revi kun vi scias,  
kaj la okulo ekradias,  
dum kun vi staras mi en front'.

Viv', vi klopodis min disknedi  
kaj trafis min eĉ per ponard',  
Sed mi ne ĉesis je vi kredi:  
ja venos junaj plu heredi  
fajron de mia fola ard'.

El Norda Prismo  
1965 (4-6)





NOTOJ PRI MORGAŬA LANDO Daŭrigo

oo

kiuj deĵoras ĉe la SPC kaj vekis intereson por uzo de Esperanto en internacia konferenco okazante en Meksiko dum Septembro.

La viglaj junuloj kaj belega vetero dum Decembro faras la Meksikian Esperanto-Kongreson rekomendinda afero sur la Esperanto-kalendaro.

K O R E S P O N D I D E Z I R A S

oo

Studento med. HANS MEYER, H. C. Lumbyesgade 9, Kopenhago  
ø, DANLANDO.

Junulino. JOSE S. RITA FILHO, Rua Iguacu 1082, ZC-12  
(Madureira), G. B. Rio de Janeiro, BRAZILIO.


Mezlernejano, 18-jara. GHENCIA DOLN, St. Miron Costin  
nr. 3, Cernavoda (Dobrogea, ROMANIA).


Fraüolino. KATE PETERSEN, Kaerstykkevej 107, Hvidovre,  
DANLANDO.

Fraüolino. N. ZDZISLAWA, Zary, Wisniowa 16, POLLANDO.

GERD REPPIN, 7033 Leipzig, Radiusstr, 12, DDR.

S-ino Ross, 20 Heath St., Wandal, Rockhampton,  
Queensland, AUSTRALIO.





Jumlaro Esperantista de Norda Ameriko  
2535 Hillegass Avenue  
Berkeley, California 94705  
USPO - USA

RETURN POSTAGE GUARANTEED

TO:

BERKELEY CALIF



BERKELEY

